



# PENSEO

N-ro 182

Dec./2006

Monata Beletra Revueto en Esperanto  
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 17-a jaro <http://www.elperno.net/penseo/penlisto.htm>

eto

## Omaĝe al Zamenhofa Tago

—laŭ ĉinesko Manjianghong

malfacile  
forpasis  
jam jarcento  
plena je  
brava, spita  
prominento  
plenkreskas nia lingvo  
ja per via talento  
surbaze  
de Fundamenta  
idento

ĉe festa  
momento  
en sankta  
silento  
ni adeptoj firmaj  
kun konsento  
omaĝas benojn belajn  
vide al firmamento  
respekte  
al vi, kun pia  
am-sento

## Post Amperdo

**Wei Qiaoyou**

En vintro de la sudo estas malvarme, kaj pluvetas jen kaj jen. En la stratoj troviĝas malmulte da pasantoj. Okaze viro aŭ virino

hasteme forpaŝas, kun unu mano levante pluvombrelon kaj la alia en la poŝo. La butikoj estas apenaŭ vizitataj, kaj kuntirinte la ŝultrojn, la mastroj de butikoj sidadas kun senesprimaj vizaĝoj. Same sinteniĝas la lombardeja mastro Qiu.

Ĝuste en la momento kiam li troviĝas en ŝtoniĝanta sidado, subite eniras junulo. Li tuj vigliĝas. Surhavante pluvŝirman surtuton, la bonaspekta juna kliento sin montras laca kaj malvigla. Lia hararo malsekiĝis de pluveroj, ĉar li ne portis pluvombrelon kun si.

Haltinte, la junulo diris, "Mi volas lombardi ion, mastro."

La mastro jam vidis multajn tiajn embarasitajn lombardantojn, kia li. Li demandis senzorge, "kion vi volas lombardi?"

Trankvila respondo, "Sincereco."

La mastro malvarme diris, "Ĝia prezo jam malaltiĝis."

"Jam malaltiĝis?" la lombardanto sentis grandan malesperon. Kaj li demandis timeme "Kaj fideleco?"

"Ankaŭ!" la mastro respondis.

La junulo faris alian timeman demandon, "Kaj amemo?"

"Ankaŭ!"

"kaj komprenemo?" alia timema demando.

La mastro senpacienciĝas, "Ankaŭ!"

Denove li timeme demandas, "Kaj sopiro kaj benpeto?"

"Malaltiĝi, malaltiĝi!"

La junulo triste mallevis la kapon, murmurante, "Iliaj ĉiuj prezoj malaltiĝis..."

La mastro grumblas, "Ĉion, kion li volas lombardi, estas fatraso."

La junulo demandis, "Kiam ili malaltiĝis?"

La lombardisto respondis, "En la okdekaj jaroj de la dudeka jarcento."

Pli deprimate, la junulo demandis, "Kaj la pura oro?"

La okuloj de la mastro ekbrilis kaj li demandis ĝoje, "ĝia prezo altiĝas. Ĉu vi havas ĝin?"

"Ne," respondis la junulo. "Mi nur havas sincerecon, fidelecon, amemon, komprenon, sopiron kaj benpeton, kiujn mi ĵus menciis."

La mastro malespere diris, "Ĉu sincereco povus esti komparata kun vera oro? Ĉu vi lombardas tion?"

"Jes."

La mastro diris, "Tiujn aĵojn oni povas utiligi en amafero. Ĉu vi ne volas ĉasi amatinon, se vi lombardas ilin?"

Tiuj vortoj eble tuŝis lian vundon. Li daŭrigis triste, "La ino, kiun mi amis kaj kiu amis min, jam forlasis min. Mi ne plu bezonas tiujn aĵojn."

La mastro diris, "Mi volas demandi, ĉu vi urĝe bezonas monon?"

"Ne urĝe."

"Sed pro kio do?"

"Finfine tio estas oro en la vera senco."

Findirinte, li prenis la povran sumon da mono por lombarditaĵo kaj foriris fulmrapide kaj malaperis en la frida vintro de la sudo.



elĉinigis **Helo**

## Bonkoro

### En Libero

Mi nun estas en libero,  
Kiu kaŭzas amarecon.  
Bela nesto tenis duon,  
Dio donis la solecon.

Ĉiu havas sian ŝin.  
Ĉu ĝi estas vera vorto?

Monotonon venkis sporto\*,

Di' ordonis:jen la sorto.

*\*Por forigi lacecon chiu tage mi motorcikladas sur la shoseo apud Jialing-rivero.*

(20-11-2006 en Chongqing)

## Konvolvulo

lastfoje floris vi aŭtune  
lastjare, vi nestis sur pergolo  
sed ĝin okupas vinberujo nune  
vi deprimiĝas jen neniam  
kontraŭe levas hupon vi al-sune



esperantigis **Lily**

## Arbo Flugaspira

deziras flugi arbo  
de birdo lernas l' arton  
en vento-pelo  
penege kun alta celo  
sed povas ne sin levi el la tero  
iutage  
je la ordono de la birdo  
elflugis multe da birdidoj  
amaso da insektoj  
flug-lernas ankaŭ sen ludflirto  
la arb' ne plu flugaspiras  
sed ĝi suspiras  
mi kvankam lernis flugi  
mi nekapable ja sor-iras  
oh bone, bone  
kapablas flugi la infanoj  
mi des pli ĝoje miras



esperantigis **Kuno**

# Ĉineske

Zhuang Qixiong (1962-)

## NOMO

— laŭ ĉinesko *Caitoufeng*

Bona nom',  
glora gnom'.  
Ebrie flirtas arom'.  
Ĉu nepre  
brilas fe'  
kun ĵaluzo  
ĉe apoge'?'  
Ne,  
ne,  
ne!

Fia nom',  
kora hom'  
pentas pri sia fantom'.  
Kiu ne  
scias ke  
viva akvo  
fluas ĉie?  
Ve,  
ve,  
ve!



\*ĉinesko *Caitoufeng*: unu el ĉinaj fiksfarmaj poemoj, konsista el du strofoj po ok versoj de 3, 3, 7, 3, 3, 4, 4, 3 silaboj, kun rimaranĝo de a, a, a, b, b, x, b, b, b,; a, a, b, b, x, b, b. kaj la lasta verso de strofo devas esti tri samaj silaboj.

## Meditado

----laŭ ĉinesko *Dekses-silabo*

Sent'  
esprimita de turment'  
forflugu

kun aŭtuna vent'!

Ment'  
splena, ofte en silent'.  
Ne ploru  
pro gaja moment'!

Pent'  
profunda kaj neprudent'  
kunfluu.  
Ja denton pro dent'!

Gent'  
malsama, amo ident'!  
Tra mondon  
homara konsent'!

\* ĉinesko *Dekses-Silabo (Shiuziling)*: unu el ĉinaj fiksfarmaj poemoj el kvar versoj de 1, 7, 3, 5 silaboj, laŭ rimaranĝo a, a, x, a (x=senrima).

## Gratulon al la eLibro "Ĉineske"

----laŭ ĉinesko *Wanghaichao*

Kun tre longa  
historio—  
kara patrolando!  
Ni fieras  
pro brila kaj  
poezia lando.  
Ĉineska frando,  
riĉa trezoro.  
Propagando  
estas la plej grava  
per Esperanto.

Vorta eleganto,  
senta eksplodo,  
ama kanto,  
pitoreska  
pejzaĝo kaj  
la petola dando.  
Ĉineska fando  
ĉiam restos en  
bona brando!

